# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 26/09/2019 Kvarcentkvardekkvina eldono (unua eldono 20/09/2011)**

## Rapide ekrigardu ĉiujn titolojn.


## Legu tiujn kiuj interesas vin

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

### Entute 821,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo




Nun studas **301,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **282,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **238,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *



# OKJARA! La Novaĵletero (AE)

## « La Aŭstraliaj Esperantistoj » naskiĝis 20/09/2011.

## Dankon al miaj karaj kontribuantoj Sen vi, AE ne povus ekzisti.






***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

**La originala celo de AE estis krei familion de la Esperantistoj el Aŭstralio kaj Novzelando per la interŝanĝo de fotoj, novaĵoj, informoj inter niaj Esperantistoj kiuj loĝas tre aparte en nia parto de la mondo.**
**La enhavo de la Aŭstraliaj Esperantistoj estas via respondeco.**




生日快乐 Feliĉan revenon de la naskiĝtago al AE-o *Roger Springer*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)*



# Gramatika serio "La Verbo en P.A.G.". N.ro.87




Pasintsemajne ni menciis la kvin lokajn "korelativojn". P.A.G. asertas, ke uzatas la jenaj pluformiĝoj: tiea; ĉiea; ĉi-tiea; ĉi-tieulo.

La tempaj tabeladverboj estas iam; tiam, kiam, ĉiam, kaj neniam. P.A.G. diras, ke "tiam" kaj "kiam" uzatas ankaŭ por "en tiu kazo" kaj "en kiu kazo", sed mi preferas resti preciza kaj uzi "tiukaze" kaj "kiukaze?". P.A.G. uzas la jenajn pluformiĝojn: iama; tiama; ĉiama; porĉiama; kaj neniamo.

P.A.G. mencias, ke la lokaj kaj tempaj adverboj estas ofte uzataj ĝemele, ekz. "Ni kuradis tie kaj ĉi tie", k.t.p., sed diras ke pli bonas la esprimoj kiaj "foje-foje", kio signifas "foje kaj foje". Mi samopinias pri "foje-foje", sed ne pri "fojfoje", kio signifas "kelkfoje je kelka fojo".

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



# Prizorgataj ĝardenoj abundas.

**GEOGRAFIA POLITIKO .**

**Pri Ĉinujo**. Oni ne povas certe scii, kiujn sekretajn planojn havas la registaroj de landoj, precipe ne de diktaturaj landoj, kvankam la grandaj internaciaj kompanioj funkcias diktature ankaŭ en t.n. demokrataj landoj. Ni povas nur diveni, ofte ĝuste. Pri Ĉinujo ni scias, ke la lando kaj ĝia ekonomio pli kaj pli fortiĝas, kaj ke tial ĝi bezonas pli da potenco en la mondo. Unu aspekto estas, ke ĝi bezonas transmigri parton de sia popolo al aliaj lokoj, do al aliaj landoj, kie ankoraŭ estas sufiĉe da loko por akcepti enmigrantojn. Unu el tiuj landoj estas Aŭstralio. Krome ĝi bezonas merkatojn por siaj varoj. Nuntempe Aŭstralio estas grava merkato por ĝi. Krome la registaro havas la strangan politikan koncepton, ke ĉinoj kiuj loĝas ekster Ĉinujo estas parto de kaj apartenas al la Ĉina Respubliko. Kun rezulto ke se ekzistas ie granda grupo de ĉinoj, Ĉinujo konsideras tiun loĝejon kiel parton de Cinujo. Tio kreas konfliktojn kun la registaroj de tiaj multĉinaj landoj.

**Pri Indonezioi**. Du gravaj problemoj por la indoneziaj registaroj estis kaj estas unue, ke la insulo Ĵavo estas tropopolita kaj ke aliaj partoj de Indonezio estas maldense popolitaj. La registaro multe penis kaj penas, inviti ĵavanojn elmigri al Borneo (Kalimantan) kaj okcidenta Novgvineo, kaj kelkaj malpli grandaj insuloj. Sed ĝis nun ĝi malmulte sukcesis pri tio, ĉar la ĵavanoj ne ŝatas loĝi aliie. Kion fari? Alia problemo estas la indoneziaj ĉinoj, kiuj okupas ja la

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

pli aktivan parton de la indonezia ekonomio. Pro ĵaluzo la indonezianoj mortigis multajn tiajn ĉinojn, tiel ke multaj ĉinoj alprenis indoneziajn nomojn kaj eĉ fariĝis islamaj, por savi sin. Sed en la indonezia parto de Borneo, Kalimantan, la enloĝantaro enhavas tiom relative multajn ĉinojn, precipe en la kelkaj urboj, ke ili sentas sin pli sendanĝeraj.

Oni povus konkludi, ke la stranga decido de la indonezia registaro establi la indonezian ĉefurbon en Kalimantaninsulo, estas klera movo celanta almenaŭ tri celojn: unue foriri el la malbona atmosfero de Djakarto kaj el la multaj pluvadoj de Bandungo; due por altiri multajn ĵavanojn al la malmulthoma Borneo, kaj trie forigi la densecon de la ĉinaj enloĝantoj tiel donante malpli da tialo por Cinujo invadi Borneon, en la estonteco. Ĉinujo jam montris interesiĝon en malgrandaj insuloj tute en la nordo de Indonezio.

*Marcel Leereveld.*

**NOTO POR ESPERANTOLOGOJ .**

Vi scias ke normale "Je tagmezo la kokinoj nutratis de mi" (el "Je tagmezo mi nutrantis la kokinojn") signifas ke je tagmezo mia nutrado kaj do ankaŭ la nutratado ankoraŭ ne finiĝis. "Ata" (same kiel "anta") ja estas la "daŭra tempo" aŭ la "daŭra aspekto" de la ago. La Pasiva Voĉo kaj la Aktiva Voĉo tamen indikas la tutan agon, do "Mi nutris la kokinojn" kaj "La kokinoj nutratis" estas la Aktiva kaj la Pasiva Voĉoj indikantaj ke la nutrado finiĝis je tagmezo. Sciante tion, la Esperantistoj ĝis la morto de Kalocsay, kaj eĉ post tio, ne akceptis "La kokinoj nutratis" por la verba pasiva voĉo, kaj ĝuste.

Sed kiam mi antaŭ trideko da jaroj trovis, ke Zamenhof uzis neformulitan "Regulon de signiforedukto", kaj sur la bazo de tio deklaris, ke en "nutrati" la signifero de tempo kaj de daŭro ne aplikiĝas al "nutrati" kaj ke do "nutrati" signifas nur la pasivecon de "ati". En mia klariga artikolo en mia gramatiklibro "Lingvaj Resondoj" mi donis plurajn ekzemplojn de tiu "Regulo pri signiforedukto". Unu estis, ke kiam ĉe participo oni ŝanĝas la adjektivon ekz. "manĝanta/manĝata" al substantivo "manĝanto/ manĝato", la signiferoj de aĵoj kaj ecoj en la signifo de la substantiva "-o" forfalas, kaj "manĝanto/ manĝato" sekve signifas nur personon. Ĉe tio mi juĝis la participojn esti origine adjektivoj.

Sed P.A.G,. kaj certagrade ankaŭ Zamenhof, juĝas la participojn origine substantivoj. Tamen se vi akceptas la P.A.G.-an originon, mia klarigo per signiforedukto tamen aplikiĝas al la reduktita signifo de la participa substantivo, ĉar por klarigi la reduktitan signifon de la origina substantivo, ekz. "manĝanto/ manĝato", P.A.G. uzas la saman regulon por klarigi tiun "regulon" de Zamenhof.

*Marcel Leereveld.*

**JACINDA .**

Mi tre ĝojas pri tio kion skribis Vera pri Jacinda, kaj pri Morrison. Njuzelandanoj (kaj novzelandanoj) povas esti fieraj pri ŝi! *Marcel.*

**KIAL NE "TIALO" ?** (notu ke ĉi tiu frazo havas du kontraŭajn signifojn, depende de la tono!).

Ĵusosemajne mi ne volis tro komplikigi mian klarigon pri "kialo-tialo", do nun mi iom pli klarigas unu el la tialoj kial oni en Eŭropo uzas "kialo", malĝuste.

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Ekzistas klara diferenco inter la signifoj de "kaŭzo" kaj de "motivo", en ĉiuj lingvoj. Sed ne en la adverboj kiuj demandas kaj kiuj respondas tiujn du signifojn. La latinidaj lingvoj kaj la angla havas nur unu vorton por demandi ambaŭ signifojn, la franca estas "*pourquoi*" kaj la angla estas "*why*" (en Esperanto KAJ "pro kio" KAJ "kial"). Kvankam tiuj lingvoj havas por la responda adverbo du diversajn esprimojn, nome "*à cause de*" kaj "*as a result of*" KAJ "*comme*" kaj "*since*", tiuj lingvoj uzas kutime la vorton "*car*" kaj "*because*" kiuj uzatas por la kaŭzo kaj por la motivo: "*Je suis retourné CAR on m'a forcé*" kaj "*Je suis retourné CAR je voulais ...*" kaj "*I returned BECAUSE I was forced to*" kaj "*I returned BECAUSE I wanted to* .....". La adverbaĵoj estas en la franca "à *cause de (cela)*" kaj la angla "*because of (that)*". Tiuj respondas KAJ demandon pri la kaŭzo KAJ demandon pri la motivo. La germana (kaj aliaj ĝermanaj lingvoj) havas specialajn, apartajn, adverbojn por demandi kaj por respondi pri la kaŭzo aŭ pri la motivo: (nederlandaj) "*waardoor*" (kaŭzo, pro kio) kaj "*waarom*" (motivo, kial), kaj "*daardoor*" (kaŭzo, pro tio) kaj "*daarom*" (motivo, tial). La nederlanda lingvo, kaj do ankaŭ la nederlandanoj, faras klaran diferencon ĉu okazo havas naturan kaŭzon aŭ ĉu ĝi estas motivigita, do decidata, de homo. En la latinidaj kaj en la angla la aŭskultanto devas mem eltrovi, aŭ imagi, ĉu temas pri kaŭzo aŭ ĉu pri motivo. En la aliaj ĝermanaj lingvoj la parolanto jam indikas tion. Esperanto kapablas esti same klara kaj preciza kiel la nederlanda, nome per "pro kio" = kaŭzo kaj "kial" = motivo, kaj "pro tio" = kaŭzo kaj "tial" = motivo, sed la eŭropaj Esperantistoj preferas la neklaran anglan sistemon, parte (ne precipe!) kaŭzantan la problemon pri "kialo-tialo". Estas stranga, ke teorie (NE praktike tamen) ankaŭ Zamenhof uzas la anglan neklaron, kvankam bone lerninta la germanan; eble ĉar ankaŭ la rusa uzas la neklaran sistemon. La neklarecon plifortigas la dusenceco de la subjunkcio "ĉar", kiu indikas kaj kaŭzon kaj motivon (do "pro tio ke" kaj "tial ke").

Kelkaj homoj defendas la signifon de "tialo" en la vorto "kialo" ĉar "kialo" formatus el la subjunkcio "kial". Unue tio kreus du malsamajn vortojn (tialo kaj kialo) por unu signifo (la motivo). Due tiuj personoj forgesas, ke la responda motivo ne estas "..., kial mi agas tiel" sed "La motivo kial mi agas tiel". Alivorte: estas "la motivo kial ....." el kio oni devas formi la substantivon, NE el "kial ....." sola. Do la motivo kiu estas la tialo, ĉar "la motivo estas la "tialo". Konsekvence oni ne povas formi "kialo" (kun la signifo de "tialo") el nur la vorto "kial" sed el la antecedento de "kial" (aŭ, se vi volas, el la antecedento kun sia subfrazo) , nome "la motivo"; kaj la motivo estas "tial". Alivorte: la vorto "tialo" estas bazita ne nur sur la suplemento "kial mi agas tiel", sed sur "La motivo kial .....".

Marcel *Leereveld.*

**LA BALKONO .**

Mi supozas, Roger, ke cia balkono ne estas "duetaĝa", ĉar tiam ĝi konsistus el du etaĝoj. Sendube ĝi estas "duaetaĝa". Pro eraro farita de Zamenhof. Kaj sendube ci devis konstrui ankaŭ ŝtuparon por atingi ĝin. Ĉu tiu ŝtuparo ankaŭ havas tegmenton?

Cetere mi ŝatus scii, ĉu en tiu balkono ci havas ankaŭ ŝrankojn. Kaj por kio vi uzos la balkonon? *Marcel*

******

Kara Marcel vi pravas, ĝi estas duaetaĝa balkono. Sub ĝi estas pavimita loko por la ekstera doma uzado de la grundetaĝaj okupantoj.

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

La konstruistoj konstruos la oportunan ŝtuparon en la domo mem.
La balkono estas laŭ la deziroj de mia edzino. Mi ne kredas ke ĝi estas ekonomia aldono al la domo sed feliĉigi la edzinon multege valoras kaj ni trovos uzon por ĝi. Amike *Roger Springer*

*****

**ADMIRO !**

Mi admiras la kelkajn Esperantistojn, kiuj klarigas al ni siajn malsamajn gramatikajn vidpunktojn, anstataŭ tiujn kiuj nur malantaŭ mia dorso instruas, ke miaj gramatikaj vidpunktoj estas nesekvendaj idiosinkraziaĵoj. Kaj mi esperas pli da publikaj klarigoj kritikaj kaj sinceraj. *Marcel Leereveld.*



# La Manlia Esperanto-Klubo





Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm ĝis 12 tagmezo, Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagota kafo atendas vin. La 21a de septembro estis la tria sabato. Venis John, Michael, Roger, Chris kaj Ian. *Roger Springer*








***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Ĝoju la belajn kolorojn de la diversaj orkideoj kaj aliaj sub-tropikaj plantoj en la ĝardeno de BES membroj Petro & Linda. Estus admirinda, ke la homaro ankaŭ estas feliĉa en sia diverseco sendepende de tio, ĉu iu estas el ĉi tie aŭ tie, riĉa aŭ malriĉa, krisphara aŭ glathara, ktp.
Eĉ la papago ĝuas la printempajn kolorojn de la naturo. *Peter Danzer*

# Melburna lingva evento



La 21an kaj 22an de septembro okazis la Melburna lingva evento. Ĝi estis organizita de 2 virinoj kiuj partoprenis en poliglotaj konferencoj en Eŭropo kaj bedaŭris, ke ne estas tiaj eventoj en Aŭstralio aŭ Nov-zelando. La evento celis lingvo-amantojn ĝenerale. La ĉefa gasto estis Richard Simcott, fama brita poligloto kiu kapablas paroli en proksimume 30 lingvoj inkluzive de Esperanto. Mi mem babilis kun li en Esperanto kaj do povas konfirmi, ke li vere kapablas flue paroli en Esperanto.



Okazis diversaj prelegoj. Richard Simcott mem prelegis dufoje, estis prelego pri kiel lerni lingvon se oni ne havas la eblecon vojaĝi al la lando kie la lingvo estas parolata. Ghil'ad Zuckermann prelegis pri la revivigo de aborigenaj lingvoj. Iu prelegis pri tio kion ili faras en Kanbero por eduki personojn pri la avantaĝoj de plurlingveco, por kuraĝigi personojn lerni fremdajn lingvojn, ktp. Mi mem prelegis dum tuta horo pri Esperanto. Sekve unu virino intencas partopreni la Esperanto-somerkursaron venontan januaron.

Dum tiu evento mi havis tablon kun faldfolioj pri Esperanto kaj mi ankaŭ rajtis meti afiŝojn sur la muron. Vidu 2 bildojn.

Amike, *Nicole Else*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# Ĉu iu jam aŭdis pri fama hispana esperantisto, Viktor Garcia?

Mi profitas de la fakto ke multaj esperantistoj ricevas la bultenon, Australiaj Esperantistoj , por demandi ĉu iu jam aŭdis pri fama hispana esperantisto , kiu pere de Esperanto multe vojaĝis, interalie en Aŭstralio en la kvindekaj jaroj. Li raportis pri siaj vojaĝoj sub la nomo Viktor Garcia. Ne restas tiom da homoj, kiuj estis esperantistoj en Aŭstralio jam en la kvindekaj jaroj, tamen mi esperas aŭdi ion de ili. Mi eksciis pri tiu vojaĝinto kadre de la 92a SATkongreso en Barcelono. Mi antaŭdankas pro ĉiu donota informo.



*Franciska Toubale*

# Respondo pri Kialo kaj Tialo

Mi dankas al Marcel pro lia ĝentila kaj informa respondo (AE 443), kaj lia invito plu komenti pri ĝi.

Unue Marcel kritikis mian serĉon tra la literaturo, trovante tian metodon “ne... valora”. Tial, mi devas klarigi, ke mi ne volis emfazi la (mal)popularecon de proponoj. Mi volis eltrovi, kiom da spertaj kaj kompetentaj esperantistoj akceptis la analizon kaj proponon de Marcel. Ŝajnas ke, eĉ post 20 jaroj, tiu nombro estas malgranda, eĉ en Aŭstralio.

Alia kialo por serĉi la literaturon estas por trovi imitindajn (kaj neimitindajn) ekzemplojn, kaj por taksi la skalon de la eventuala problemo. Se ekzistus problemo, la sekva afero estus eltrovi, ĉu iuj kompetentuloj jam proponis solvojn. Oni ne povas forigi fundamentan vorton, sed esperantistoj rajtas proponi neologismojn. Aliaj parolantoj aŭ akceptas la neologismon aŭ ne. Se ne, ĝi mortas.

> Ekzemple, en la okdekaj jaroj, Rüdiger Eichholz pledis por la vorto *komputoro*, aliaj preferis la vorton *komputilo* aŭ *komputero*, ktp. Antaŭlonge evidentiĝis ke *komputilo* estas akceptita kaj uzata, kaj la aliaj proponoj mortis.

Ne meritas reinventi la radon. Ne meritas konstrui pajlohomojn. Ne meritas krei nenecesajn problemojn. Ekzemple, la esprimo el Vikipedio “tiala erodo” estus “stulta” nur se oni akceptus la rezonadon de Marcel.

La unua demando estas, do, ĉu ja ekzistas problemo aŭ, kiel Marcel nun precizigas, “problemeto”. La vorto *kial* ja estas fundamenta vorto kun la signifo *kiukaŭze, kiumotive* (Butler, Cox, PIV). Marcel opinias ke ĝi devus signifi nur “*laŭ kiu motivo*”. Laŭ lia analizado kaj rezonado, mi supozas, ke li malpermesus la jenajn simplajn demandojn:

- Kial la pluvo falas teren? Respondo: pro la gravito.
- Kial la domprezoj altiĝis? Ebla respondo: pro la inflacio.

Mi supozas, ke li insistus, ke oni diru:

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

- Pro kio la pluvo falas?
- Pro kio la domprezoj altiĝis?

En lia respondo (AE 443) al mia artikolo (AE 441), Marcel klarigis, kiel li analizis la bazan strukturon de la tabelvorta sistemo kaj kial li proponis neologismon *tialo* por anstataŭi la jam longe uzatan vorton *kialo*. Li kritikis la substancon de mia artikolo en du punktoj, sub la titoloj "La unua malfacilaĵo" kaj "La dua grava eraro". Mi nun respondas al tiuj kritikoj.

## "La unua malfacilaĵo"

Marcel asertis, ke **"kaŭzo havas neniun rilaton kun motivo"**.
Mi konsideras, tamen, ke ĉi tiuj du konceptoj estas interrilataj. Kiel montras la ekzemploj donitaj en PIV en la artikolo pri *kaŭzo*, unu el la tri signifoj estas *motivo*. Tial la propono de Marcel kondukus al redifino de *kaŭzo,* sed *kaŭzo* estas fundamenta. Tial la problemo kreskas. Lia proponita solvo por la "problemeto" havas gravajn flankefikojn.

Marcel asertis, ke **"la nocio 'kaŭzo' troviĝas en neniu el la korelativoj, kaj tial devas ne troviĝi en la diskuto"**. Ni konsideru, tamen, la sekvantajn ekzemplojn:

- ***Kial** la floroj hodiaŭ aspektas tiel senkoloraj?* (kaŭzo) — Fabeloj de H.C. Andersen, Floroj de la Malgranda Ida. Tradukita de Zamenhof.
- *La efektiva **kaŭzo**, **kial ili ne aliĝas al ni**, estas tio, ke ili timas.* — Originala Verkaro, paĝo 123.

Tial, la baza ideo de la rezonado de Marcel pri *kial* estas kontraŭfundamenta.

Marcel menciis, ke la nederlanda lingvo havas du vortojn por la signifo de *kial* — unu por kaŭzo kaj unu por motivo. La problemo ĉe tiu ideo estas, ke kiam oni demandas "Kial...?", oni ne necese scias, ĉu la respondo estos kaŭzo aŭ motivo, do kiun demandovorton uzi? Tia dilemo kreus gravan komunikan problemon por la Internacia Lingvo.

## "La dua grava eraro"

Marcel asertis, ke

- **" la preciza signifo de 'kialo' estas '*demando* pri kio estas la *motivo*' ",**

sed la vorto **kialo** neniam havis tiun limigitan signifon. (Marcel deziras, ke ĝi havu tiun signifon.) Plue, Marcel konsideras, ke

- **kial(o)** estas **demanda**; **tial(o)** estas **respondo**,

sed ankaŭ tio ne estas pravigebla, kiel ni vidos sube; ĉar, en *la Ekzercaro* de *la Fundamento de Esperanto* (kun mia emfazo):

*Ia, ial, iam, ie, iel, ies, io, iom, iu. – La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni, ĉar el ili ĉiu povas jam fari al si grandan serion da aliaj pronomoj kaj adverboj. Se ni aldonas al ili la literon **"k"**, ni ricevas vortojn **demandajn** aŭ **rilatajn**: kia, **kial**, kiam, kie, kiel, kies, kio, kiom, kiu. Se ni aldonas la literon **"t"**, ni ricevas vortojn **montrajn**: tia, **tial** , tiam, tie, tiel, ties, tio, tiom, tiu...*

Tie ni vidas, ke *kial* povas roli kiel demanda aŭ rilata; *tial* kiel montra. Jen Zamenhofa

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

ekzemplo kun rilata *kial*:

- *Nun li komprenis, **kial** la viro sur la maldekstra flanko havis maldolĉan migdalon.* — Fabeloj de H.C. Andersen, Sub la Saliko. Tradukita de Zamenhof.

Sur tiu fundamenta bazo, mi nun povas doni simplajn ekzemplojn, kiuj klarigas kaj pravigas kutimajn uzojn de la vortoj **kial**, **kialo**, **tial, tialo**.

**Kial/Kialo**

- **Kial** la pluvo falas teren? (demanda — pri kaŭzo en ĉi tiu kazo, aŭ eventuale pri motivo aŭ intenco)
- La infano demandis, **kial** la pluvo falas teren. (demanda, pri kaŭzo; rilata [angle, *why*; tradicie oni nomis tian vorton "rilata adverbo" kaj tiun uzon "rilata"])
- Respondante, la patro diris, **kial** la pluvo falas teren. (responda, prikaŭza, rilata)
- Pli mallonge: Responde, la patro diris **kial**. (responda, prikaŭza, rilata)
  Tio estas: Responde, la patro diris la **kialon**.
- Mi neniam demandus al li, kial oni ĵetis lin en malliberejon, sed li diris al mi, **kial**. (prikaŭza, rilata)

**Tial/Tialo**
(*montras* la *rezulton*, kiu sekvas pro *kaŭzo* aŭ motivo aŭ intenco).

- Fulmo frapis la lignan domon. **Tial** la domo ekbrulis. (montra, kaŭza, rezulta)
- Fulmo frapis la lignan domon. La **tiala** brulado detruis la domon. (montra, kaŭza, rezulta)

Sekve,

- Fulmo frapis la lignan domon. La **tialo** estis, ke la domo forbrulis. (montra, kaŭza, rezulta)

**Tial, ke (ĉar; pro tio, ke)**
(*montras* la *kaŭzon* aŭ motivon aŭ intencon, pro kio …)

- La domo ekbrulis **tial**, ke fulmo frapis ĝin. (montra, prikaŭza)
- Kial la ligna domo ekbrulis? **Tial**, ke fulmo frapis ĝin. (responda, prikaŭza, montra).

Tamen, kiel ni vidis supre (Kial/Kialo)

- **Kial** la ligna domo ekbrulis?
  Respondante, oni diris, **kial** la ligna domo ekbrulis. (responda, prikaŭza, rilata)
  La **kialo** estas, ke fulmo frapis ĝin.

Ni rimarku, en la Fundamento, ke Zamenhof aldonis,

> *ke el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj (sufiksoj); ekzemple: tiama, ĉiama, kioma, tiea, ĉi-tiea, tieulo, tiamulo k. t.*

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

*p. (= kaj tiel plu).*

Tial, oni ja rajtis krei la vorton *kialo*. Oni nun rajtas krei kaj uzi la vortojn *tiala* kaj *tialo*, se nur ili estas klaraj kaj kompreneblaj, kaj ne konfliktas kun jam uzataj kaj ĝenerale akceptataj vortoj. (Ekzemple, oni ne faras, el *ĉiel*, la vortojn *ĉiela* kaj *ĉielo*, ĉar ili jam ekzistas kaj havas tute alian signifon.) Tamen, la afero pri la vorto *tialo* estas komplika. Bedaŭrinde, tio kondukis al polemikado sen plena kompreno, tial kreante konfuzon kaj konflikton.

## Pluaj komentoj

La sola mencio de *tialo* en PIV havas tute nerilatan signifon:
*tial/o* □ *Organika substanco analoga al aldehido, en kiu sulfuro anstataŭas oksigenon; ĝenerala formulo: R-CHS.*

El la demandaj tabelaj vortoj, nur tri havas uzatan o-vorton tian, kian ni diskutas: *kialo* (kaŭzo aŭ motivo), *kielo* (maniero), kaj *kiomo* (la nombro aŭ kvanto entenata). Notu, ke ĉe tiuj o-vortoj neniam temas pri la demando en la senco, kiun Marcel proponas. Do lia propono kondukus nin al la demando, ĉu ŝanĝi ankaŭ la difinojn de *kielo* kaj *kiomo*, por ke ili estu konsekvencaj kun la de Marcel proponata signifo de *kialo*.

La vortoj *kielo* kaj *kiomo* estas uzataj malofte, eĉ malpli ofte ol *kialo*. Estas facile eviti ilin tial, ke ekzistas sinonimoj.

## Konkludo

Mi dankas al Marcel pro la klarigo pri lia propono. Tamen, li ne konvinkis min, ke ĝi solvas ekzistantan problemon. Ĝi certe kreas problemojn, kiel mi diskutis supre. La afero ne estas tiel simpla, kiel li volas kredigi.

### Referencoj

Butler, Montagu C., *Esperanto-English Dictionary*, BEA, 1967.

Cox, Major-General George, *Esperanto Grammar & Commentary*, BEA, 4th Edition Revised [undated, 1st edition 1906]

La Fundamento en Esperanto, http://www.akademio-de-esperanto.org/fundamento/ekzercaro.html

La korelativoj: https://en.wikipedia.org/wiki/Esperanto_vocabulary#Correlatives

PIV: vortaro.net

Zamenhof, *Floroj de la Malgranda Ida*, http://www.steloj.de/esperanto/fabeloj1/floroj.html

Zamehof, *Sub la Saliko*, http://www.steloj.de/esperanto/fabeloj3/saliko.html

## Dankon

Mi dankas al Vilhelmo Aldridge, pro liaj helpaj komentoj. *Donald Rogers*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Se vi ankoraŭ ne povas uzi la Esperantajn literojn, uzu la 'x' post la litero kiu bezonas la supran signon

**Esperanto x-system to Unicode - Chrome Web Store**

Edits Esperanto x-system documents to Unicode

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***